UFE monhelpas ĉiujare LK kaj ĝian Akademion. LK estas memstara, sed la NS povas prezenti kandidatojn al ĝi.

Praktikaj servoj kaj delegitoj.

1. La servojn de UFE rajtas uzi ĉiu membro de la Federacio kaj ĝi ricevas senpagan kuponaron[52] por informpeto. La servoj de informpeto kaj helpo al la vojaĝantoj[53] estas prizorgataj de la delegitoj, helpataj de la vicdelegitoj kaj estas principe senpagaj.

2. La skribaj informpetoj devas esti precize formulataj, tre legeble[54] skribataj en la oficiala lingvo Esperanto kaj korekte afrankataj. La petanto indiku ĉiam sian plenan adreson kaj membronumeron kaj aldonu ĉiam kuponon por informpeto kaj respondkarton aŭ internacian respondkuponon. La skribaĵoj montru sur la adreso la titolon de la delegito de UFE, por ke ili estu transdonataj al la anstataŭanto, se li forestas. — Prezentante sin rekte al la delegito por peti servon, la membro devas montri sian membrokarton por la kuranta jaro. — Ne-plenumo de ĉi tiuj kondiĉoj nuligas[55] la rajton pri plendo.

3. Oni ne rajtas peti servojn kontraŭ la celoj de UFE aŭ la bonaj moroj, informojn kun konfidenca karaktero (pri morala indeco[56], pagokapablo aŭ familiaj cirkonstancoj de persono) aŭ peti en la nomo de nemembro.

Servoj, kiuj necesigas[57] multan tempon, teknikan konon aŭ specialajn klopodojn, por kiuj salajro aŭ maklerpago estas kutimaj, ne estas devigaj por la del. kaj, se li ne volas fari la servon, li respondu kaj laŭeble[58] sendu liston de personoj aŭ firmoj prizorgantaj[59] tiajn negocojn.

La interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj kartoj, la rondirigo[60] de leteroj aŭ petskriboj kaj similaj ne koncernas la servon de informpetado, sekve ili ne estas devigaj por la delegito.

4. Por kaj dum vojaĝoj la membroj de

UFE povas peti la konsilon de la del. pri ĉiuj turismaj aferoj. — La del. donas ĉiujn informojn por faciligi la restadon en la urbo, sed ne estas lia devo iri al rendevuoj, atendi la membrojn en la stacidomo aŭ ilin promenigi[61]. La del. informas la grupon pri la alveno de fremdaj esperantistoj.

5. La del. estas respondeca pri la bona funkciado de la servoj en sia loko. En la limtempo de 7 tagoj post ricevo de laŭregula informpeto la del. devas zorge respondi. Se la informo bezonas pli longan tempon, li respondas provizore. Se li ne povas plenumi la peton, li sciigu la petinton pri la kaŭzo, konsilante se eble la taŭgan vojon. La del. zorgas dum sia foresto pri transdonado de la korespondaĵoj al la vic-del. La del. konservas en bona ordo ĉiujn leterojn kaj dokumentojn, kiuj koncernas lian oficon. Ili ne estas lia propraĵo[62], sed ili estas regule transdonataj al la posteulo[63].

6. La plendoj pri malbone faritaj servoj estu sendataj al „Komisiono pri praktikaj servoj de UFE", kiu rekte esploras pri la faktoj, informante la NS, kiu siaflanke rajtas esplori. Se la esploroj rezultigas[63] ne gravan malkorektecon, la Komisiono oficiale sed ne publike admonas la kulpigiton[64]. Pro ripetitaj malkorektaĵoj aŭ pro gravaj mankoj de la del. la Komisiono interkonsente kun la NS rajtas fari publikan admonon kaj ankaŭ eksigi[65] la del.

7. En ĉiu loko kun E-grupo, kies membroj aliĝas al UFE pere de NS, la grupo proponas del. kaj vic-del. al la NS, kiu petas de ili formalan promeson pri plenumo de la devoj laŭ la regularo, aprobas ilin kaj informas UFE pri ilia elekto.

8. La delegiteco estas honora ofico; ĝin uzi por persona profito aŭ por favorigi[66] iujn personojn aŭ firmojn estas malpermesate.

9. La del plenumas la servojn de UFE kaj interrilatigas[67] la fremdajn membrojn kun la loka grupo. — La vicdel. estas kunlaboranto kaj anstataŭanto de la del. kaj ĉiuj reguloj por la del. validas laŭsence por li.

10. En unu loko estu kutime nur 1 del. kaj vic-del. Grandaj urboj laŭ propono de la loka grupo kaj aprobo de la NS povas esti dividataj en partoj kun po 1 del. aŭ vicdel. Tiam devas esti 1 centra del., kun kiu povas interrilati la fremdulo, ne konanta la dividon de la urbo. La centra del. dividu la petojn inter la diversaj del. de la urbo.

11. Kie oportune povas esti ankaŭ elektataj del. kun faka agadkampo.

12. Del. devas esti membro de UFE, laŭeble plenaĝa enlandano[68], daŭre loĝanta en sia loko kaj, sub kutima rezervo de gravaj malhelpoj, promesanta plenumi sian oficon tri sinsekvajn jarojn. Li bone konu la E-lingvon kaj movadon.

13. Se la grupo ne faras formalan elekton de nova del. je la fino de la ofic-tempo (3-jara), la NS rajtas konfirmi la del. por nova tempdaŭro de 3 jaroj.

14. La del. perdas sian oficon pro demeto, se li ne plu loĝas regule en la loko, se li ne plu estas membro de UFE, laŭ decido de la Komisiono pro grava malplenumo de la devoj de l' delegiteco.

15. Kiam ofico de del. vakas, se post 2 monatoj la grupo ne zorgis pri nova propono, la NS rajtas rekte nomi novan del.

16. En lokoj, kie ne estas grupo, sed nur izolaj membroj de la NS, del. kaj vicdel. povas esti nomataj de la NS. Tie la del. estas reprezentanto de UFE kaj de la NS laŭ ĝia regularo. Li propagandas, varbas membrojn kaj klopodas starigi novan grupon.

17. La NS klopodas, ke en ĉiu loko de la lando, kie estas esp.-istoj, estu elektata del. de UFE kaj zorgu, ke la listo de la del. kaj vicdel. estu ĉiam en ordo por la regula publikigo en la Jarlibro. La ŝanĝoj devas esti tuj konigataj al CO de UFE, publikigataj en naciaj gazetoj kaj en la bulteno de UFE.

18. En regnoj, kie ne estas NS aliĝintaj al UFE, ICK zorgos pri la elekto de provizoraj del. pere de nacia sekretario.

IX. Komisionoj.

1. Estas kreataj Komisionoj kun 3 membroj, kies misio estas, konstante kontroli sian koncernan fakon, averti la respondecajn personojn pri la eventualaj mankoj kaj eblaj eraroj en la funkciado de la koncernaj servoj; sekvi la bonan realigon[69] de la laboroj, komisiitaj al la plenumaj organismoj ktp.

2. Almenaŭ 5 el tiuj komisionoj devas ekzisti laŭstatute: a) Komisiono por Propagando, b) Komisiono por Praktikaj Servoj, c) Komisiono por Financoj, d) Komisiono por la Jarlibro kaj e) Komisiono por la Bulteno.

3. Ĉiu komisiono elektas prezidanton, kiu rilatas kun ĉiuj instancoj kaj servoj de UFE.

4. La komisionanoj estas elektataj de IKR. Kandidatojn povas prezenti la NS.

5. Povas esti kreataj aliaj komisionoj ekstere de IKR: pri Radio, gazetaro ktp.

X. Universalaj Kongresoj de Esperanto.

1. ICK de UFE okazigas la UK de E kaj komisias ilian organizon al LKK laŭ reguloj kaj kondiĉoj aprobitaj de IKR.

La UK de E konsistas el: Solena malferma kunsido. — Laboraj kunsidoj, en kiuj la oficialaj institucioj prezentas raportojn kaj aŭdas la rimarkojn kaj deziresprimojn de la kongresanoj. — Fakaj kunsidoj. — Prelegoj sub la titolo „Somera Universitato". — Kunsidoj de la diversaj oficialaj komitatoj aparte aŭ kune.

La Institucioj nomataj „oficialaj" estas: IKR, ICK, LK kaj ĝia Akademio.

2. En UK de E povas partopreni „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon E, tute

egale, por kiuj celoj li uzas ĝin", kondiĉe, ke tiu persono sendas sian aliĝon al LKK kaj pagis al ĉi tiu sian kotizon.

3. La celo de la kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj komuninteresaj por ĉiuj esp.-istoj, kun escepto de religiaj, politikaj kaj klasbatalaj demandoj, kiuj estas netuŝeblaj en kongresa kunsido, kaj la lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo estas rezervataj al LK kaj ĝia Akademio. Tamen por ebligi al kongresanoj, kiuj interesiĝas[70] pri unu aŭ alia el tiuj demandoj, ilin priparoli inter si en privataj kunsidoj.

4. Ĉar la funkciado de la oficialaj institucioj estas reguligata[71] per la statuto de UFE, reviziebla[72] nur de la kompetentaj instancoj, la kongreso ne rajtas alpreni decidojn devigajn, ĉu por izolaj esp.-istoj, ĉu por la E-societoj, ĉu por la oficialaj institucioj, sed ĝi plene rajtas esprimi dezirojn kaj konsilojn. Por decidigi[73] pri tiuj deziresprimoj aŭ konsiloj, la koncernaj institucioj aŭ komitatoj pritraktas ilin kiel eble plej baldaŭ.

5. LKK pagas al UFE kvoton de 20% el la kotizoj de la kongresanoj. La procento povas esti ŝanĝata laŭ decido de IKR. Eventuala profito el ĉiu kongreso apartenas al UFE, kiu donos trionon de ĝi al la NS en la kongreslando.

6. La Kongresa Estraro konsistas, krom la protektantoj, la honoraj prezidantoj kaj honoraj membroj, el: Prezidanto, kelkaj vicprezidantoj, reprezentantaj la oficialajn instituciojn kaj la plej gravajn organizaĵojn[74] de la movado; la konstanta sekretario de la kongresoj, la ĝeneralaj sekretarioj kaj iliaj helpantoj. La estraro estas elektata de la kongreso en la Malferma Kunsido laŭ propono de IKR, kiu en antaŭkunveno kun LKK starigas la plenan liston de la proponataj personoj.

7. Por solena Malferma Kunsido, se okazas naciaj salutparoladoj, ili estos ordigataj laŭ alfabeta ordo de la nomoj de la regnoj. El ĉiu reprezentata regno parolos nur unu delegito, elektata de sia NS.

8. **Fakaj sekcioj.** Por la esploro de ĉiuj specialaj aŭ teknikaj temoj aŭ eĉ de temoj rezervitaj pro kongresa neŭtraleco, oni povas formi fakajn sekciojn . . . . .

9. **Kongresaj kunsidoj.** La kongreso diskutas pri: a) la temoj senpere metitaj de ICK aŭ IKR en la tagordon; b) la temoj metitaj de ICK en la tagordon laŭ propono de E-organizaĵoj aŭ de enskribiĝintaj[75] kongresanoj, se ili alvenas ĉe ICK almenaŭ 3 monatojn antaŭ la kongreso; c) la dezirojn kaj konkludojn de la sekcioj, prezentitajn al la kongreso.

10. Regularo por la kongreskunsidoj: a) la malferma solena kunsido estas malfermata de la prezidinto de la antaŭa kongreso aŭ de lia anstataŭanto, kiu prezentas la nomliston de la de IKR proponata estraro de la kongreso. La elektita prezidanto daŭrigas[76] la gvidadon . . . .

11. Krom la UK de E povas okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj laŭ decido de ICK aŭ de IKR. Tiuj instancoj tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj aŭ religiaj.

12. La oficialaj komunikoj de la oficialaj institucioj estas publikigataj pere de la E-gazetoj. La oficialaj dukumentoj kaj raportoj estas publikigataj per zorgo de ICK en la Oficiala Bulteno kaj en la Oficiala Dokumentaro laŭ ĝia nuna formato.

XI. Oficialaj Jarlibro kaj Bulteno.

1. UFE aperigos[77] ĉiujaran jarlibron kaj oficialan bultenon, kiujn ricevos ĉiu membro laŭ kondiĉoj de ĉapitro VI. Tiu ĉi bulteno aperos minimume dufoje dum la jaro kaj povas esti presata pli bone en la gazeto de la konserna NS, se tian gazeton ricevas ĉiu membro. Se ne ICK liveras al la NS sufiĉan kvanton da represaĵoj[78] por la dissendo[79].

2. La oficejestro interŝanĝas la Oficialan Bultenon kun la E-gazetoj kaj sendas al ili, en kazo de urĝeco, ĉiujn informojn necesajn.

XII. Honoroficoj. Mon-kompensoj.

Ĉiuj funkciuloj[80], krom tiu de la oficejestro kaj lia oficistaro, estas plenumataj honorofice kaj sen kompensa salajro aŭ subvencio. Tamen laŭ decido de ICK, apartaj servoj povas esti mone kompensataj.

XIII. Modifoj en la statuto.

Modifoj povas esti pritraktataj nur, se la propono estas prezentita de la estraroj de almenaŭ ses NS kaj sendita almenaŭ 6 monatojn antaŭ la kongreso al IKR . . .

XIV. Disiĝo[81].

1. UFE ne povas esti disigata[82], se almenaŭ 3 NS restas al ĝi aliĝintaj. Propono pri disigo devas esti decidata de IKR per minimume 2/3 de ĉiuj voĉoj de siaj membroj. La limtempo por la propono kaj cetera procedo de eventuala disiĝo estas la sama, kia tiu por la modifoj en la statutoj laŭ ĉapitro XIII.

2. En kazo de disiĝo IKR decidas pri la destino de la havaĵo de UFE.

Ni presigis ambaŭ leterojn kun la tuta statutaro, por ke ĉiu samideano faru al si la ĝustan bildon kaj decidu pri la aliĝo al UFE. Certe la Komitato faris bonan laboron kaj mi nur povas deziri, ke ankaŭ UEA komprenu tion kaj konkorde en Zamenhofa senco interkonsentu kun la nova UFE, kiu vere estis necesa por la gravaj taskoj estontaj de nia movado.

Steiner

---

[1] al-pren-at-a angenommen; [2] regul-ar-o Satzung; [3] gazet-ar-o Presse; [4] ŝanĝ-ot-aj geändert werden sollen; [5] ven-ont-aj kommenden; [6] Haltung; [7] estr-ar-o Leitung; [8] unu-ec-ig-o

Vereinheitlichung; [9] kon-ig-u bekanntmachen; [10] aliĝ-ont-o-j die sich anschließen werdenden; [11] sekv-ot-an der befolgt werden soll; [12] estr-ar-an-o-j Leitungsmitglieder; [13] star-ig-it-a-n aufgestellt; [14] sam-ide-an-o Gleichgesinnter; [15] tiam-a damalige; [16] s-ro=sinjoro; [17] d-ro= doktoro; [18] pli-bon-ig-i verbessern; [19] über etwas sprechen, besprechen; [20] re-met-i zurückstellen; [21] sci-ig-o Mitteilung; [22] est-ont-e künftighin; [23] dev-ig-is zwang; [24] dir-it-e gesagt; [25] ek-ag-i zu handeln beginnen; [26] mal-facil-aĵ-oj Schwierigkeiten; [27] inter-lig-a verbindend; [28] facil-ig-i erleichtern; [29] dis-vast-ig-ad-on Verbreitung; [30] dis-volv-iĝ-o Entwicklung; [31] publik-ig-i veröffentlichen; [32] neŭtral-ec-o Neutralität; [33] elekt-ebl-aj wählbar; [34] membr-ec-o Mitgliedschaft; [35] al-iĝ-int-a sich angeschlossen habend; [36] esp.-isto=esper-ant-isto Hoffende=Esperantist; [37] korespond-aĵ-oj Korrespondenzen; [38] plen-um-o Erfüllung; [39] rekomend-ind-a empfehlenswert; [40] anstataŭ-ig-i sin sich vertreten lassen; [41] rajt-ig-ant-an berechtigend; [42] ofic-ej-estr-o Amtsvorstand; [43] re-elekt-ebl-aj wiederwählbar; [44] lot-um-i verlosen; [45] el-ir-ont-ajn austreten werdenden; [46] okaz-ig-as veranstalten; [47] real-ig-o Verwirklichung; [48] ofic-ist-ar-o Beamtenschaft; [49] en-ofic-ig-ata ins Amt eingeführt; [50] el-don-ist-o Herausgeber; [51] en-kas-ig-it-ajn kotiz-aĵ-ojn einkassierte Beiträge; [52] kupon-ar-on Abschnittsheft; [53] vojaĝ-ant-oj Reisende; [54] leg-ebl-e leserlich; [55] nul-ig-as für ungiltig erklären; [56] ind-ec-o Würdigkeit; [57] neces-ig-as notwendig machen; [58] laŭ-ebl-e möglichst; [59] pri-zorg-ant-aj besorgend; [60] rond-ir-ig-o in die Runde gehen lassen; [61] promen-ig-i spazieren führen; [62] propr-aĵ-o Eigentum; [63] post-e-ul-o Nachfolger; [64] kulp-ig-it-on Beschuldigten; [65] eks-ig-i ausschließen; [66] favor-ig-i begünstigen; [67] inter-rilat-ig-as in Verbindung bringen; [68] en-land-an-o Inländer; [69] real-ig-on Verwirklichung; [70] interes-iĝ-as sich interessiert; [71] regul-ig-it-a geregelt; [72] revizi-ebl-a überprüfbar; [73] decid-ig-i entscheiden lassen; [74] organiz-aĵ-ojn Organisationen; [75] en-skrib-iĝ-int-aj die sich eingeschrieben habenden: [76] daŭr-ig-as fortsetzt; [77] aper-ig-os wird erscheinen lassen; [78] re-pres-aĵ-oj Abdrucke; [79] dis-send-o Versandt; [80] funkci-ul-oj Funktionäre; [81] dis-iĝ-o Auflösung; [82] dis-ig-it-a aufgelöst.

Honorigo de s-ano konsistoria konsil. P. Franz de Paula Mestan. La 1. de decembro en ĉeesto de granda, distinga publiko la distriktestro de Krems, kie P. Mestan nun estras la kune-vivejon de la Piaristoj, kortega kons. Vogel enmanigis al P. Mestan la arĝentan Honorinsignon, per kiu nia ŝtatprezidanto lin estis distinginta. Per tre afablaj vortoj kort. kons. Vogel parolis pri liaj grandaj meritoj koncerne sian ordenon, la urbon Krems kaj la Esperanto-movadon. Sekvis alparoladoj de l' urbparoĥestro de Krems preposto Joh. Schrimpf, urbestro Karl Rohrhofer, dekano J. Arnberger (Egelsee), provincialo de la Piarist-Ordeno P. Theodor Till (Wien), ĉefmedicin-kons. d-ro Sauer, komunuma kons. s-ino Rosa Portele, kortega kons. gimnazidirektoro Maier, reg. kons. Steiner (Int. Centra Komitato-Genève, Int. E-Muzeo kaj AEA), s-ano L. Chiba (Int. kaj Aŭstria katol. E-movado), N. Hovorka (Wien-aj E-Asocioj), Fr. Stanke (E-grupo Krems). Emociite la distingito dankis.

Skolta ĵamborejo en Budapest 1933.

Centran rekontejon por E-skoltoj aranĝos laŭ oficiala komisio la Budapest a skolta trupo n-ro 199. Tie okazu kunvenoj de SEL, tendarfajro, paroladoj, prezentadoj pri E, ekspozieto. Hungaraj skoltoj esp. ĉiam tie rekonteblaj. — Se ĉe iu nacia trupo estos kelkaj E-bone sciantaj sk., tiu trupo povos peti oficiale E-interpretiston, kiu klarigos ĉion en E kaj la E-scianta fremda sk. tradukos ĉion al sia trupo en sia nacia lingvo. Tiamaniere E povos ludi helpan rolon kaj ĉiuj profitos de ĝi.

Aperis Skoltfakvortareto, eld. de ĵamborea oficejo, en 5 lingvoj, por hungaraj skoltoj, inter ili en Esp. — Eldonaĵoj en E: Sciigoj pri la ĵamboreo, legendo pri la pracervo hungara, resumo de ĵamborea regularo, priskribo de hungara skolta movado, mallonga raporto pri oficiala uzo de E en Hungara Sk.-Asocio. P. Balkanyi, Budapest, poŝto 507, repr, de SEL.

Kio estas AELA?

Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj (AELA) sub la financa garantio de Literatura Mondo, Budapest, deziras doni al la publiko je proksimume la kvarono de la kutima prezo valorajn kaj belaspektajn librojn.

Vidu la programon por 1933: Por la kotizo de 13.50 sv. fr. AELA donos 6 librojn pksm. 2000 paĝojn, nome: Hungara Antologio, Pri l' Moderna Arto, Preter la Vivo kaj Pilgrimo (aŭ Dancu Marionetoj, Streĉita Kordo, Teorio de Esp. aŭ Eŭgeno Onegin), La Sorĉistino el Kastilio, Febro kaj Enciklopedio de Esp.

Fariĝu membroj de AELA, pagante la kotizon antaŭ 1. februaro (krom la sendkostoj) aŭ pagante ĝin post tiu dato, ankaŭ en partpagoj, sv. fr. 17.—.

La afero estas tre grava. Specialajn informojn donas kontraŭ reafranko IEMW aŭ Literatura Mondo, Budapest IX. Mester ucca 53, V. 7.

Difino. La vivo estas trajno; la jaroj, stacioj; morto, la stacio de alveno; kuracistoj, la lokomotivoj; apotekistoj, agentoj, vendantaj la biletojn. (Hispana E-Gazeto)

Neplenumebla deziro.

Viro riĉiĝinta dum krizo venis kun sia familio en grandurbon, kie li ekloĝis en plej multekosta hotelo. Lia edzino estas entuziasmigita per banejo, apartenanta al la luprenita ĉambraro kaj bedaŭras: »Domaĝe, ke ni banis hejme antaŭ 14 tagoj! Kiel ni povus ĝui nun la banejon ĉi tie!«

(Laŭ »Ligilo«)

Unerfüllbarer Wunsch.

Ein während der Krise reich gewordener Mann kam mit seiner Familie in eine Großstadt, wo er in dem teuersten Hotel Wohnung nahm. Seine Gattin ist begeistert von einem Badezimmer, das zu der gemieteten Zimmerreihe gehört, und sagt bedauernd: »Schade, daß wir zu Hause vor 14 Tagen gebadet haben! Wie könnten wir jetzt das Bad hier genießen!«

La parolanta hundo.

Kiam la fama ventroparolisto Alexander restadis en bauloko, situanta en la sudo, foje anglo eksidis ĉe lia tablo. Alexander salutis, sed la anglo, kiu estis tre silentema, preskaŭ ne resalutis. Alexander ĉagreniĝis kaj decidis doni lecionon al sia malĝentila kunmanĝanto. Li alvokis sian pudelon, kiu per signo de li sidiĝis sur seĝon flanke de li. Poste li mendis 2 Wienajn kolbasojn.

– Ankaŭ por mi du, kriis la hundo al la kelnero.

Mirigite la anglo rigardegis al la hundo, poste al ĝia mastro kaj demandis interesate: Sed, ĉu –, ĉu estas eble, via hundo scias paroli?

– Kompreneble jes, ke li scias paroli, respondis Alexander

Kiom ĝi kostas?

– Mi ne estas aĉetebla, energie protestis la hundo.

Sed la anglo absolute deziris aĉeti la hundon kaj finfine li metis 2000 da kronoj sur la tablon.

– Nu jes, je tiu prezo mi vendos la hundon, diris Alexander.

– All right, ĝoje diris la anglo. De nun la hundo parolu anstataŭ mi. Depost hodiaŭ mi parolos eĉ ne unu vorton.

– Ankaŭ mi ne faros tion, deklaris la hundo, kaj ĝi plenumis sian vorton.

(Laŭ »La Verdulo«)

Der sprechende Hund.

Als der berühmte Bauchredner Alexander in einem im Süden gelegenen Badeorte sich aufhielt, setzte sich einmal ein Engländer an seinen Tisch. Alexander grüßte, aber der Engländer, der sehr schweigsam war, grüßte fast nicht zurück. Alexander ärgerte sich und beschloß, seinem unhöflichen Mitesser eine Lektion zu erteilen. Er rief seinen Pudel herbei, der sich auf ein Zeichen von ihm auf einen Sessel an seiner Seite setzte. Dann bestellte er 2 Wiener Würstel.

– Auch für mich zwei, schrie der Hund zum Kellner.

Verwundert sah der Engländer auf den Hund mit großen Augen, dann auf seinen Herrn und fragte interessiert: Aber, ist –, Ist es möglich, daß Ihr Hund sprechen kann?

– Natürlich ja, daß er sprechen kann, antwortete Alexander.

– Was kostet er?

– Ich bin nicht käuflich, protestierte energisch der Hund.

Aber der Engländer wünschte unbedingt den Hund zu kaufen und endlich legte er 2000 Kronen auf den Tisch.

– Na ja, um diesen Preis werde ich den Hund verkaufen, sagte Alexander.

– Gut, sagte freudig der Engländer. Von jetzt soll der Hund anstatt meiner sprechen. Von heute an werde ich nicht ein Wort sprechen.

– Auch ich werde das nicht tun, erkärte der Hund, und er hielt Wort.

XI-a Katolika Kongreso (7.–11. aŭg.) en Betharram kun pilgrimo al Lourdes bone sukcesis. Reprezentantoj el 13 landoj.

XII-a Kongreso de SAT okazis de 6.–11. aŭg. en Stuttgart. Malgraŭ la mondkrizo partoprenis pli ol 300. La XIII-a okazos 5.–10. aŭg. 1933 en Stockholm.

La 1. **Kongreso de IPE** (Internacio Propetara Esp. okazis en Germanujo en ĉeesto de 350 personoj el 12 landoj. Proponita statuto estis akceptita. »Internaciisto«, ĝia organo havas 2716 abonantojn; eldonejo EKRELO eldonis dum la lasta jaro pli ol 50 librojn.

(Laŭ »Bulteno de CK de SEU, Moskvo«).

Svisa E.-Societo, admin. grupo St. Gallen dissendas raporton de Ed. Stettler, reprezentanto de SES en KR, sub titolo »**La Pariza Kongreso**«, Organizo Internacia Esperantista, pledante ĉefe por supernacia kunlaboro, ĝis nun ebligita per la ekzistado de UEA.

Ĉilo. En Santiago de Chile estas fondita »Esperantista Junularo de Ĉilo«, kies membroj estas ĉefe el la liceoj de la ĉefurbo. La estraro konsistas el: S-roj Luis Sepulveda Cuadro, Honora Prezidanto: Guillermo Gómez A., Prez., Salomón Chornik, sekr., Harnán Garrido, kas. – Direkt. de ICK Kreuz estis nomita Honora Membro.

Grekujo: Per la klopodoj de la helena pioniro d-ro Anakreon Stamatiadis la 1. Helena E-Kongreso okazis dum julio en Ateno, kiun kun vere kuraĝigaj vortoj malfermis s-ro Ev. Kakouros, direktoro de la Ministerio de Kultoj kaj Publika Instruado, anstataŭante la malhelpitan ministron. Ni elkore gratulas pro la sukceso.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Linz, Weissenwolfstr. 31

Graz. La 9. dec. reg. kons. Steiner ĉeestis grupkunvenon kaj parolis pri aktualaj demandoj.

Linz. En Metia Kleriga Lernejo kursoj kun 180 gelernantoj. Laŭ klopodoj de prez. Wannek la lerneja konstantaro starigis 2 kursojn anstataŭ 1. Tamen estis necese elekti inter la sinanoncintoj. Kursgvid. s-ano Mraz.

Mattighofen. E-kursongvidas sekr de AEA Ulbrich.

Ried. Tre bone vizitata parolado de s-ano Jungschaffer pri „E und seine Zukunftsmöglichkeiten", kiun ĉeestis urbestro kun edzino, vicurbestro, urba paroĥestro (dekano). gimnaziaj profesoroj kaj aliaj gravaj personoj. Sekvis parolado de advokato d-ro Halbedl pri liaj longjaraj spertoj kiel esperantisto, precipe ĉe E-kongresoj. Kongresafiŝo pri Köln invitis al la XXV-a. Ambaŭ parolintoj rikoltis grandan aplaŭdon.

Wien: Esp.-Unuiĝo. La 18. nov. digna memorfesto je nia pioniro kolonelo Zwach Riĉenhava programo. — 2. dec. s-anoj Gasparini recitis „La morton de Tiberio" de Zwach kaj dir. Kaftan parolis pri „Kolonelo Zwach en la horloĝmuzeo".

Inter la skoltaro dissenditaj varbfolioj vekis intereson. Lernolibroj menditaj.

De noveldonitaj **varbpoŝtkartoj** ni jam vendis 2000.

Kristnaska Kolekto. Donacis „Fideleco"-Wien 20 S, direkt. Karl Wannek, Linz 10 S.

K. Wannek, prez. de AEA

Koran kondolencon kaj kunsenton al niaj fervoraj s-aninoj **Adele Heidinger** kaj **Emma Prokop** en Krems okaze de la **morto** de ŝiaj karaj patrinoj. Steiner

ESPERANTO-SOCIETO POR STIRIO
Graz, VI., Schönaugasse 6.

Leitungssitzung vom 11. und Hauptversammlung vom 25. XI. Die letzte Leitungssitzung beschäftigte sich mit der ev. Abhaltung von Kursen und beauftragte den Schriftführer, mit den 3 hiesigen Gruppen in Fühlung zu treten. Dem neuerlichen Ansuchen des Esperanto-Institutes für das Deutsche Reich um Unterstützung kann wegen Geldmangels und aus technischen Gründen nicht entsprochen werden; es ist hievon zu verständigen. Da Frau Marco ihr Amt als Verschleißerin von Werbematerial zurücklegt, soll künftig Herr Bauer den Vertrieb übernehmen. Für die Hauptversammlung sind nur 3 Vertreter namhaft zu machen. Endlich wird der bindende Beschlus gefaßt, das verbilligte Werk »Jarmiloj pasas« anzukaufen.

Aus dem Bericht über die Hauptversammlung sei Folgendes hervorgehoben: Beiträge und Lesegebühren bleiben unverändert in Geltung, desgleichen unsere Mitgliedschaft bei AEA, DEB, Urania und Landesverband für Fremdenverkehr. Auch die Zusammensetzung der Vereinsleitung bleibt dieselbe. Einen schmerzlichen Verlust bedeutet die Liquidierung der Ortsgruppe Leoben, die auf 2 Mitglieder zusammengeschmolzen ist. Die Mitteilung über die Möglichkeit einer gemeinsamen Mitgliedschaft bei AEA und UEA erregt Befremden wegen geflissentlicher Übergehung der österreichischen Provinz, die hierüber erst am 7. d. M. mittels Rundschreibens einen recht ungenauen Bericht erhielt. H. Rogler wird beauftragt, über diese Frage mit der Leitung des österr. Esperantobundes und H. Reg. Rat Steiner, dessen AE als fallweises Bundesorgan vorgesehen ist, in Unterhandlungen zu treten und der Leitungssitzung am 16. XII. über deren Ergebnis zu berichten. Dr. Biehler

---

Propagando por Köln: S-ano R. M. Frey germane parolis antaŭ distinga publiko en la bela salonego de Niederösterr. Gewerbeverein pri Köln kun lumbildoj kaj filmo.

Esperanto-Klub, Wien.

Für Repräsentation und Geselligkeit wurde der Klub am 8. Dez. in seinem Heime, Wien I., Schwedenplatz (Kaffee Siller, »Goldener Saal«) gegründet. 60 Mitglieder. Gewählt: Vorsitzender: Reg. Rat Steiner, Stellv. W. Smital u. Fr. Dr. Flasch, Schriftf. Fr. Siedl, Ing. Blauhut Kassier Dr. Postl, Skrutatoren: Frau Baumeister Pötzl und geistl. Rat Hosner. Zusammenkünfte jeden 2. Donnerstag 20 h. Aufnahme nur nach Einführung durch ein Mitglied. Auskünfte IEMW, Tel. R 27-803.

Nächste Veranstaltung am 12. Jänner: Unterhaltungsabend mit Künstlerprogramm, Conferencier Alex. Vallas.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) Bürgergasse 4, Fr (v) 20-23 h.

Linz.

Oberösterr. Esp.-Verein: Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstraße.

Steyr:

Oberösterr. E.-Verein: Gemeinschafterheim Schlüsselhofstr., Fr. (v.), 20 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Freyung 6 (Schottenpfarrkanzlei) Mi (me) 18—20 h.

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Schubertring (kafejo Kolowrat) Fr. (v.) 19.30 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

Vienna Akademia Unuiĝo Esp. VII., Neubaugasse 25 (Kafejo Elsahof), Mo (l) 19-23 h.

Esp.-societo „Fideleco", Café Zoglmann, XVIII., Staudgasse 1, Di (m), 16-19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.